

Eŭropa Bulteno

Decembro 2011, Numero 111

NOVJARE POR NIAJ LEGANTOJ!

Tiun ĉi poemon sendis al mi bona zagreba esperantistino Mirjana Žeželj ĉi-printempe kaj ŝi mortis en aŭtuno. La aŭtoron de la poemo mi ne eltrovis inter diversaj asertoj troveblaj en la reto.

La redaktoro



When I born, I black
 When I grow up, I black
 When I go in Sun, I black
 When I scared, I black
 When I sick, I black
 And when I die, I still black

And you white fellow
 When you born, you pink
 When you grow up, you white
 When you go in sun, you red
 When you cold, you blue
 When you scared, you yellow
 When you sick, you green
 And when you die, you gray

And you calling me colored?

Kiam mi naskiĝas, mi nigra
 Kiam mi elkreskas, mi nigra
 Kiam mi iras sub Suno, mi nigra
 Kiam mi timas, mi nigra
 Kiam mi malsana, mi nigra
 Kiam mi mortas, mi nigra.

Kaj vi, blanka amiko,
 Kiam vi naskiĝas, vi rozeca
 Kiam vi elkreskas, vi blanka
 Kiam vi iras sub Suno, vi ruĝa
 Kiam vi malvarmumas, vi blua
 Kiam vi timas, vi flava
 Kiam vi malsana, vi verda
 Kiam vi mortas vi griza

Kaj vi nomas min kolora?

NIAJ LANDAJ MOVADOJ: ESPERANTO-MOVADO EN LATVIO

Esperanto-movado en Latvio komenciĝis en 1889, kiam estis eldonita la unua Esperanto-lernolibro por latvoj, ĝin verkis Rudolfs Libeks (1854-1908). Lernolibro de Libeks estis la 29-a Esperanto libro laŭvice kaj la unua eldonita ekster Varsovio. Informon pri ebleco lerni lingvon li publikigas en loka gazetaro jam meze de 1888 ("Baltlanda Heroldo" 14-15an de junio 1888). En 1890 Libeks translokiĝis al Brazilo kaj mankas informoj, ĉu li tie okupiĝis pri Esperanto, kvankam li estis la unua esperantisto en tiu lando.

En 1904 en Rigo estis fondita filio de Peterburga Esperanto-societo „Espero“, en 1910 Esperanto-societo „Riga Stelo“, kiu en 1910 kaj 1911 eldonis samnoman monatan gazeton kaj en 1912 – Riga Esperanto-societo. En dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento movado eĉ pli vigliĝis, kursoj okazis en Rigo, Liepāja, Jelgava, Ventspils kaj aliaj lokoj, fondiĝis Esperanto-societoj, oni eldonis lernolibrojn kaj vortarojn.



En 1925 Riga Esperanto-societo komencis eldoni monatan revuon "Ondo de Daŭgava" (1925-1935), en 1927 organizis la unuan Latvian Esperanto-Kongreson. Post ŝanĝo de statuto en 1928 Riga Esperanto-societo iĝis Latva Esperanto-societo kaj la ĉefa Esperanto-organizaĵo en Latvio. En 1930 en Rigo okazis la 1-a Baltlanda Esperanto-kongreso.

Oni organizis multajn kursojn kaj invitis ilin gvidi ankaŭ eksterlandajn instruistojn, inter ili estis ankaŭ Andreo Cseh kaj Julio Baghy.

En 1941 lige kun la sovetia okupacio Esperanto-movado en Latvio estis malpermesita, Latva Esperanto-Societo likvidita.

Renoviĝo de la movado post la 2-a Mondmilito komenciĝis nur en la jaro 1956. En gazetaro aperis artikoloj pri lingvaj problemoj, estis organizitaj prelegoj kaj lecionoj. En 1957 revuo "Zvaigzne" ("Stelo") publikigis korespondajn lecionojn de konata latva esperantisto Eduards Jaunvalks (1901-1989), samjare estis eldonita Esperanto-Latva kaj Latva-Esperanta vortaro kun gramatiko. Kursojn samtempe frekventis pli ol 900 interesitoj, en 1960 fondiĝis Riga Esperanto-klubo ĉe Domo de Klerigo, rondeto ĉe Latva Ŝtata universitato, esperantistoj havis klubojn en Cēsis, Daugavpils, Ventspils kaj Liepāja.

En 1959 en Latvio apud Riga ĉe lago Baltezers okazis Baltia Esperanto-Tendaro, kiun partoprenis 50 gejunuloj el Latvio, Litovio kaj Estonio. Tio iĝis tradicio - organizi laŭvice en

unu el Baltiaj ŝtatoj Esperanto-aranĝon, kiu nun nomiĝas Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET), ĝin partoprenas mezume 100 ĝis 200 esperantistoj el 10-20 landoj.

En 1980 estis fondita Latva filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, kiu ekzistis ĝis la jaro 1988.

La nunan Latvian Esperanto-Asocion (LatEA) oni fondis la 11an de decembro 1988, ekde 1989 ĝi estas membro de UEA, ekde 2006 membro de EEU. Nuntempe en la asocio membriĝas proksimume 100 esperantistoj el Rigo, Liepāja, Cēsis, Jelgava, Valmiera kaj aliaj lokoj de Latvio.

Estraro de LatEA konsistas el 7 personoj, kiujn oni elektas por 3 jaroj. Ekde 2007 prezidantino estas Margarita Želve, vicprezidantino - Biruta Rozenfelde, esperantistino de 1956, organizantino de la unua BET en 1959.

Unufoje dum 3 jaroj asocio organizas Baltiajn Esperanto-tagojn. Ĉi-jare en Latvia vilaĝo Mālpils, situanta 60 kilometrojn sudorienten de Riga ekde la 9-a ĝis la 16-a de julio okazis jam la 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. BET-ejo funkciis en la Profesia mezlernejo de Mālpils, kiu entute gastigis 116 partoprenantojn el 14 landoj. Programo de BET iom similas al tiu de UK - estas organizitaj diversnivelaĵoj Esperanto-kursoj (ankaŭ por neesperantistoj), enkondukita kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, okazas Sankta Meso en Esperanto (ĝin jam la duan fojon brile gvidis katolika pastro – esperantisto Māris Laureckis). Oni havas riĉan programon – Interkonan vesperon, Solenan malfermon, akcepton en urbodomo, diversajn koncertojn, ludojn, tuttagan kaj duontagajn ekskursojn, Adiaŭan vesperon k.a.



Precipe popularaj estas kantvesperoj kaj koncertoj de profesia kantistino Austra Pumpure el urbo Liepāja kaj ŝia ensemblo “Animo” – grupo de gejunuloj al kiuj Austra instruas Esperanton per kantoj. Al ŝiaj koncertoj dum BET-oj kutime venas ankaŭ loka publiko, ĉar Austra estas ege populara en Latvio. Ankaŭ dum siaj koncertoj al ĝenerala publiko Austra Pumpure ofte mencias Esperanton per kio ŝi trovis amikojn en tuta mondo kaj eĉ kantas po unu kanto en internacia lingvo.

Ekde 2008 Latvia Esperanto-Asocio kunlaboras kun la Ŝtata Agentejo pri Lingvoj – okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj agentejo organizas lingvajn metiejojn kun devizo “Ekkonu lingvojn” dum kiuj interesitoj havas eblecon konatiĝi kun diversaj lingvoj. Esperanto metiejon kutime vizitas 10-15 partoprenantoj (precipe gelernantoj). Metiejo daŭras du akademiajn horojn, dum

kiuj gelearnantoj ricevas bazan informon pri lingvo, partoprenas amuzan kurseton de Esperanto laŭ Cseh-metodo, aŭskultas latvajn popolajn kantojn en internacia lingvo. Poste dum komuna kunveno de ĉiuj metiejoj (kutime estas reprezentataj 15-17 lingvoj) oni kurte raportas pri la farita laboro kaj gratulas la plej aktivajn lernantojn.

En Rigo ĉe Riga Latva societo jam 8 jarojn funkcias Esperanto-klubo gvidata de Biruta Rozenfelde. Parto de Rigaj esperantistoj estas anoj de Riga Latva societo kaj dank' al tio senpage ekhavis ejon por klubkunvenoj okazantaj ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato, krom someraj monatoj. Oni havas programon kompilitan por la tuta laborsezono, al kiu laŭvice kontribuas preskaŭ ĉiuj klubanoj.



Por Ĝeneralaj kunvenoj de Riga Latva societo oni raportas ankaŭ pri laboro de Esperanto-klubo kaj tiu raporto estas publikita en la ĉiujara bulteno de la societo.

Ĝeneralaj kunvenoj de Latvia Esperanto-asocio ankaŭ okazas en la domo de Riga Latva societo kaj ĉiu intereso povas ilin viziti kaj konatiĝi kun Esperanto-ekspozicio.

En Latvia Universitato en 2006 estis registrita kiel liberelekta studokurso “Enkonduko en praktikan interlingvistikon, Esperanto”. Ĝin surbaze de lernolibro de Laurynas Algimantas Skūpas ĝin kompilis lektoro de la Universitato Aivars Kalniņš kaj profesoroj Andrejs Bankavs kaj Leons Taivans. Post la duonjara parte perkomputila, parte dialoga lernado studentoj devas plenumi ekzamenon laŭ skemo de Miĉigano – percepto aŭda, traduko skriba, prezento parole kaj scribe. Kvankam ĝis nun la

intereso de studentoj de Latvia Universitato pri la nova studokurso estis ne tro granda, la mem fakto, ke oni povas oficiale lerni Esperanton en la plej granda altlernejo de Latvio, estas grava atingo de latvaj esperantistoj.

Ne tro ofte sed tamen tempo al tempo aperas informoj pri Esperanto en amaskomunikiloj, pli multe antaŭ kaj dum BET-oj. Por reklami BET LatEA sendas artikolojn al diversaj interretaj portaloj, la aranĝo estas respiculita ankaŭ en radio kaj gazetaro.

En 2005 omaĝe al la 140-a datreveno de elstara latva poeto Jānis Rainis (1865 –1929) estis eldonita poemaro “Antaŭen”. Ĝin kompilis kaj komputile kunmetis Margarita Želve, ilustris esperantistino Alise Mediņa – libro enhavas 11 originalajn grafikaĵojn de la juna kaj talenta pentristino.

En 2009 folkloro grupo “Muzikistoj de Maskaĉka” eldonis duoblan KD de 33 latvaj popolaj dancoj. Ĝi enhavas 80-paĝan libreton kun detalaj priskriboj de dancaj paŝoj en latva kaj Esperanto laŭ kiuj ĉiu povas lerni la dancojn.

En 2010 estis kreita nova hejmpaĝo www.esperanto.lv, kie dume oni povas trovi informojn nur en Esperanto, sed la paĝo estos evoluata kaj baldaŭ aperos ankaŭ en latva lingvo.

Dume pro diversaj kaŭzoj ne plu aperas informbulteno "Latvia esperantisto", membraro ricevas la bezonatajn informojn rete, sed asocio planas renovigi ĝin en 2012.

La plej aktivaj latvaj esperantistoj regule partoprenas la kongresojn de UEA kaj EEU, ankaŭ diversajn malpli grandskalajn aranĝojn – IF (Internacia Festivalo), kongresojn de IFEF, ILEI k.a., sed plej amase – Baltiajn Esperanto-Tagojn.

Margarita Želve, prezidantino de Latvia Esperanto-Asocio

INVITO OKAZE DE LA JARO DE TIBOR SEKELJ


Ni invitas ĉiujn legantojn kaj aliajn esperantistojn sendi laŭeble urĝe kaj amase la jenan tekston (prefere en la angla) al Guglo al la adreso: proposals@google.com



»We ask Google to dedicate its frontpage on the 14 February 2012 to the memory of Mr Tibor Sekelj. He was a great world-explorer, writer, geographer, ethnologist, journalist and filmmaker, and was from Yugoslavia. This date is the 100th anniversary of his birth.«
Pro la mallonga restinta tempo faru tion laŭeble baldaŭ.

La redaktoro

PROVIZORA PROGRAMO DE LA 9-A KONGRESO DE EEU EN GALIVO



www.eeu-kongreso.webnode.com

Lundo, la 16-an de julio 2012

8.00 – 16.00: akcepto de kongresanoj kaj loĝigo

16.00 – 18.00: SOLENA MALFERMO (Salutvortoj de Seán, salutvorto de la urbestro, eventuala alia irlanda gravulo, Prelego de irlanda ministrino pri eŭropaj aferoj: Lerneja politiko rilate lernadon de lingvoj en Irlando, prelego de Seán pri Dokumento de la Platformo por multlingveco de EU, eventualaj salutoj de reprezentantoj de diversaj landoj ĉeestantaj, irlanda kaj eŭropa himnoj

20.00 – 22.00: Nacia vespero: dancoj kaj kantoj de Irlando

Mardo, la 17-an de julio 2012

9.00 – 10.30: Unua prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Angella Tellier pri la brita eksperimenta instruado Lingvolanĉilo
 10.30 – 12.00: Dua prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Iu Irlanda fakulo pri la lingvoj en irlandaj lernejoj kaj pri eventualaj propedeŭtikaj efektoj de antaŭa lingvo al la posta
 12.00 – 14.00: Paŭzo por tagmanĝo
 14.00 – 17.30: Asembleo de EEU (fermita)
 14.00 – 17.30: Vizito de la urbo Galivo
 14.00 – 16.00: Kunveno de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA)
 17.30 – 18.30: Prelego pri irlanda historio
 20.00 – 21.00: Teatraĵo de Shelter scenejo el Kragujevac: »10 tagoj de kapitano Postnikov«
 21.00 – 22.00: Koncerto de irlanda muziko

Merkredo, la 18-an de julio 2012

9.00 – 10.30: Tria prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Kiom polaj infanoj lernantaj Esperanton pli bonas en scio de aliaj fremdlingvoj, la propra lingvo kaj geografio
 10.30 – 12.00: Kvara prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Tim Morley pri la eksperimenta lernado de Esperanto en brita lernejo
 12.00 – 14.00: Tagmanĝopaŭzo
 14.00 – 15.30: Nikola Rašić: Prelego pri lingva situacio de Romaoj en Eŭropa Unio
 15.30 – 16.30: Teatarĵo de Georgo Handzlik: "Ludoviko-Lazaro"
 15.30 – 16.30: Paul Gubbins: Tri prelegetoj pri originala Esperanto-literaturo
 16.30 – 18.00: Ronda tablo pri la temo por la popola iniciato en EU proponata de EEU
 20.00 – 21.30: Kantkoncerto de Georgo Handzlik kaj JoMo

Ĵaŭdo, la 19-an de julio 2012

9.00 – 10.30: Kvina prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Zlatko Tišljari pri la propedeŭtika eksperimento en Slo-Hr-At de 1993-1995
 10.30 – 12.00: Ses prelego de la konferenco pri propedeŭtiko: Seán Ó Riain (aŭ alia irlanda fakulo) pri problemoj rilate la lernadon de la irlanda lingvo en elementaj lernejoj
 12.00 – 14.00: Tagmanĝopaŭzo
 13.30 – 15.30: Kunsido de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj
 14.00 – 15.30: Maja Tišljari raportas pri la Triesta konferenco de EEU
 16.00 – 18.00: Malfermita Asembleo de EEU
 20.00 – 21.30: Nova kabareda programo de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik »Kompleta (preskaŭ) Historio de Universalaj Kongresoj - kabareda farso pri kutimoj de esperantistoj«

**Vendredo, la 20-an de julio 2012**

9.00 – 10.30: Diskuto kaj konkludoj de la konferenco pri propedeŭtiko
 9.30 – 11.00: Solena Fermo de la kongreso: raporto de Seán Ó Riain pri la kongresa laboro kaj akceptitaj dokumentoj, pri reago de la galiva publiko, pri nova maniero organizi kongreson kun profesia neesperantista teamo, kanto de himnoj, eventuala mallonga koncerto de iu irlanda infano aŭ junula grupo. Prezento de la estonta laboro de EEU (Z. Tišljari)
 12.00: Foriro al la postkongreso kaj hejmeniro

Mardo – ĵaŭdo dumtage en la angulo de E@I:

Informadikaj laborejoj, kursoj kaj prelegoj de E@I

EEU PLU AKTIVAS EN LA PROJEKTO POLIGLOTTI4.EU

Kadre de la projekto poliglotti4.eu de la Europa platformo por promocii multlingvismon en kiu membras ankaŭ EEU, en Madrido okazis renkontiĝo de civilsociaj organizoj kun interesgrupoj de EU. Dum la renkontiĝo estis prezentitaj rezultoj de la unua jaro de la projekto kiu celas promocii multlingvismon en EU kaj konstrui retejon kiu informos pri bonaj praktikoj kaj lingvoprojektoj. La renkontiĝon partoprenis pluraj reprezentantoj de Eŭropa Komisiono inter kiuj Belén Bernaldo de Quiros, la chefo de la multlingvisma unuo de Eŭropa Komisiono.



La Prezidanto de EEU, Seán Ó Riain prezentis la programon "Springboard to Languages" hispane kaj angle al la ĉeestantaro en la madrida reprezentejo de la Eŭropa Komisiono la 1-an de decembro 2011. La Komisiono volas ke la Platformo daŭrigu sian laboron. Montriĝis multa intereso al la propono por uzo de Esperanto-kursoj por sproni plibonigon de la lingvolernado ĝenerale en la EU-landaro, kaj neniu kontraŭis la proponon.

Maja Tišljár

PRI LA POPOLINICIATO

La dokumentaro pri tio estas sufiĉe komplika. Januare Eŭropa Komisiono aperigos oficialan retejon pri la popoliniciato en la 23 EU-lingvoj kiu klarigos la tutan proceduron. Mi bone konas ĝin ĉar mi jam irlandigis la tuton - temas pri centoj da paĝoj. Ĉi tie mi prezentos ĝin resume kaj nur la ĉefajn punktojn:

1. Leĝe nenio povos komenci antaŭ la 1-a de aprilo 2012. Ni intencas tuj post tiu dato sendi proponon de EEU pri vortoj de Eŭropa himno al la Eŭropa Komisiono.
2. La Komisiono havos 2 monatojn, do aprilo kaj majo, por akcepti aŭ malakcepti ĝin.
3. Nur se la Komisiono akceptas ke ĝi estas taŭga propono leĝe, oni povas komenci kolekti subskribojn, do en julio 2012.
4. Tiam, se la Komisiono akceptos, ni havos precize 12 monatojn, do ĝis julio 2013, por kolekti 1 milionon da subskriboj.
5. Estos ankaŭ minimumo da subskriboj kiun oni devas kolekti en 7 EU-landoj, kaj oni devas antaŭe nomi komitaton de 7 homoj kiuj loĝas en tiuj 7 EU-landoj.
6. Poste la naciaj aŭtoritatoj de tiuj 7 EU-landoj devos validigi la subskribojn. Ili havas 3 monatojn por fari tion, do ĝis oktobro 2013. Nur tiam oni povos submeti la tutan formale al Eŭropa Komisiono, kaj estos kunveno kun la Komisiono por prezenti ĝin, kaj alia kunveno por prezenti ĝin en Eŭropa Parlamento.
7. Tiam la Komisiono devos politike konsideri la proponon. Se ĝi malakceptas, ĝi devas

publikigi la kialojn por la malakcepto. Se ĝi akceptos ĝin, la Komisiono faros leĝproponon al la Parlamento kaj al la Konsilio. Fine estas ili, la Konsilio kaj la Parlamento kune, kiuj faros la finan decidon akcepti aŭ malakcepti.

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

POLA PREZIDANTECO DE EU KAJ ZAMENHOF

S-ro Mikołaj Dowgielewicz - Ministro de Pola Prezidanteco en EU plenumis la promeson skribitan private al Kazimiro Krzyżak de sia Ministerio - kaj aperigis la informon pri Ludoviko Zamenhof okaze de lia 152 datreveno de la naskiĝo - en la oficiala ttt-ejo de Pola Prezidanteco en EU en la pola kaj Esperanto, en la angla kaj Esperanto, en la franca kaj Esperanto kaj en la germana kaj Esperanto. Tio estas jam duan fojon - ĉar unua informo pri Esperanto en la pola kaj Esperanto kaj la angla - okazis sur la ttt-ejo de Pola Prezidanteco en EU jam la 26-an de julio okaze de la 124-a datreveno de la publikigo de la Unua Libro (do fakte naskiĝo de Esperanto).



En la retejo www.pl2011.eu aperis la jena artikolo en 5 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

La 152-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof.

La 15-an de decembro 1859 naskiĝis Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto. La solenadojn de la 152-a naskiĝdatreveno akompanas pluraj eventoj, renkontiĝoj kaj koncertoj organizataj i.a. en Varsovio kaj Bjalistoko.

D-ro Ludoviko Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko. Laŭ biografoj ĝuste tie, en la urbo enloĝata de reprezentantoj de multaj kulturoj, religioj kaj lingvoj en la infana menso de Ludoviko kreiĝis la ideo de komuna lingvo foriganta la etnajn kaj lingvajn diferencojn inter la homoj. Ĉi tiu ideo ne forlasas lin, kiam la tuta familio translokiĝas al Varsovio. Tie ĉi en 1878 en grupo de gimnaziaj kolegoj li solene festas la unuan version de la universala lingvo. Tamen de tiu projekto ĝis la matura versio de Esperanto pasas 9 jaroj.

Ludoviko Zamenhof finas medicinajn studojn, sed dum la tuta tempo li laboras pri la projekto de la lingvo, kiu fariĝas lia vivoverko. La unua libro de la Internacia Lingvo aperas la 26.07.1887. Ĝia nomo deriviĝas de la pseŭdonomo de la aŭtoro de la lernolibro d-ro Esperanto, kiu simple signifas personon, kiu havas la esperon.

“La unua Libro”, tian titolon portas la lernolibro, eldonita komence ruse, pole, angle enhavas krom la gramatikaj principoj, prononcreguloj kaj vortareto la unuajn literaturajn tradukojn. Ili reliefigas la komunikan maturecon de Esperanto, ĝian literaturan flekseblecon kaj agrablan sonon.

Esperanto rapide akiras novajn adeptojn kaj de preskaŭ 125 jaroj estas la unusola planita lingvo, kiu funkcias en la ĉiutagaj kontaktoj de centoj da miloj da homoj de ĉiuj kontinentoj, dum kongresoj, seminarioj, temrenkontiĝoj. Riĉa originala kaj traduka literaturo el ĉiuj lingvoj, radioelsendoj, gazetaro, la interretaj portaloj kaj diskutgrupoj atestas pri la sukceso de d-ro Ludoviko Zamenhof, kiu en 1959 estis rekonita Elstara Civitano de la Mondo. Du Unesko-rezolucioj el 1954 kaj 1985 konfirmas la pozicion de Esperanto en la kulturaj

atingaĵoj de la homaro kaj elmontras ĝiajn komunikajn valorojn en la reciproka dialogo kaj proksimiĝo de la homoj de ĉiuj kulturoj kaj lingvoj.

Francisko Witucki,

Prezidanto de Pola Societo Europro - Demokratio - Esperanto (EDE-PL)

RADIKALA PARTIO RADIKALE POR ESERANTO

La fina rezolucio de la 39-a kongreso de la Radikala Partio (komplete: “Senperforta Radikala Partio Transnacia kaj Transpartia”) okazinta en Romo 2011-12-08.2011 enhavas priesperantan eron kiu la engaĝitecon de tiu Partio konfirmas per vortumo aparte aŭdaca laŭ jurdoktrina aspekto (“la fundamenta rajto - de ĉiuj kaj de unuope ĉiu – je lingva komunikado”; “homara rajto alfabetiĝi pri la Internacia lingvo - nomata Esperanto - certigota / sekurigota kiel homa rajto”) kaj tre defia se juĝi laŭ la efikeco de la tiucela politika agado (“homa rajto agnoskota / agnoskenda fare de la internacia kaj eŭropa leĝaroj, de la transnacia komunumo kaj de la ceteraj jurejoj kaj jurfontoj”).

Jen la (provizora / neoficiala) traduko:

“La 39-a Kongreso de la “Senperforta Radikala Partio Transnacia kaj Transpartia”, okazinta en Romo de la 8-a ĝis la 11-a de decembro 2011-a [...] reasertas la fundamentan rajton - de ĉiuj kaj de unuope ĉiu – je lingva komunikado, sen privilegioj kaj kun senlima avantaĝo por ĉiuj, tiel kontribuante al gardado de la ekosistemo de la lingvoj, havaĵo de la tuta homaro, kaj rekonfirmas sian sindevigon por la rajto de la homo lerni la bazajn elementojn de Esperanto, kaj formale igi tiun rajton agnoskota kiel homa rajto fare de la internacia kaj eŭropa leĝaroj, de la transnacia komunumo kaj de la ceteraj jurejoj kaj jurfontoj”.

Ranieri Clerici

LJUDMILA NOVAK – VICPREZIDANTINO DE LA SLOVENA PARLAMANTO



En la lastaj balotoj de Slovenio la 4-an de decembro 2011 konata esperantistino Ljudmila Novak estis elektita membro de slovena parlamento kaj fine de decembro ankaŭ vicprezidantino de la parlamento. Ljudmila Novak estas laŭprofesie instruistino de la germana kaj slovena lingvoj kaj literaturoj. Dum siaj gimnaziaj jaroj ŝi lernis Esperanton en Maribor kaj ankaŭ partoprenis en du TEJO-kongresoj.

Pri politiko ŝi komencis okupiĝi en 2000 en la partio Nova Slovenio. En 2001 ŝi estis elektita urbestrino de urbeto Moravĉe proksime de Ljubljana kaj okaze de balotoj por Eŭropa Parlamento en 2004 ŝi estis elektita eŭropa parlamentanino. Kiam en 2008 ŝia partio malsukcesis en la slovenaj balotoj kaj ne plu havis parlamentanojn en la slovena parlamento, la tiama prezidanto de Nova Slovenio rezignis pri la prezidanteco kaj ŝi estis elektita prezidantino de la partio. De 2009 ŝi ne plu estis membro de Eŭropa Parlamento sed tre sukcese preparis sian partion por la

novelektoj kiuj okazis ĉi-jare kaj sukcesis ricevi pozicion en la slovena parlamento per 4,8% (4% estas minimumo por eniri la parlamenton), kio signifas ke ŝia partio nun en la 90-persona parlamento havas 4 parlamentanojn.

Dum ŝia mandato de eŭropa parlamentano ŝi tre aktive subtenis Esperanton unue dum la EEU-kongreso en Maribor kaj poste partopreninte en pluraj aranĝoj de EEU, organizis ekspozicion pri Esperanto en Brusela Parlamentejo kaj fine per rekta propono de amendoj rilataj al Esperanto en la Komitato por Kulturo de la Eŭropa parlamento, kiuj bedaŭrinde estis forĵetitaj ĉefe pro forta kontraŭstaro de la germana eŭropa parlamentano Doris Pack, prezidantino de tiu Komitato.

EEU proklamis ŝin en 2008 la honora membro de EEU kaj la proklamo okazis en Ljubljana okaze de Tago de Eŭropaj Lingvoj. Supozeble ŝi pretos subteni la poresperantan agadon ankaŭ en la estonto.

Zlatko Tišljar

PROTESTLETERO AL POLA MINISTRO SIKORSKI



Interkonsente kun la prezidanto de EEU mi sendis protestleteron al pola ministro por eksteraj aferoj Radek Sikorski nome de EEU pro asertoj ene de lia parolado en Berlino la 28-an de novembro. Mia protesto rilatis al du liaj asertoj.

Ĉi tie mi publikigas en Esperanto la plej gravajn partojn de la letero sendita al li en la angla:

»En la 6. parto de via parolado unue vi asertis: »En Italio estis dirite en la 19-a jarcento: Ni kreis Italion, nun ni kreu italojn. Por ni en EU estas pli facile. Ni havas unuigintan Eŭropon, Ni havas eŭropanojn. Ni devas nur krei eblecon por politika esprimo de tuteŭropa publika opinio.«

Tio estas el nia vidpunkto plene arbitra aserto. En EU neniu ŝtato-membro havas edukon en lernejoj pri eŭropaj valoroj kiel bazo por konsciigi eŭropanojn pri eŭropeco. Ĉiu lando daŭre edukas siajn junajn civitanojn nur pri la graveco de naciaj valoroj, kulturoj kaj historio. Kiu lando edukas pri eŭropaj valoroj, kulturo kaj historio? Pro tio ne ekzistas eŭropanoj kun forta eŭropa identeco. Ili povus ekesti nur kelkajn jardekojn post kiam oni enkondukus edukadon pri eŭropaj valoroj, kulturo kaj historio en ĉiuj lernejoj de EU. Funkciantaj federacioj kiel USONO kaj Svislando havas tion jam dum jarcentoj. (Bonvolu vidi pri eŭropaj valoroj en www.wix.com/dtisljjar/europa).

La dua via aserto ŝokis nin: »... Britio povas subteni reformojn. Vi (Britio) donis al la Unio komunan lingvon!«

Sed, sinjoro ministro, Eŭropa Unio ne havas komunan lingvon. Ĝi havas egalrajtajn 23 oficialajn naciajn lingvojn kaj ĝuste la Platformo pri multlingveco havis la taskon ellabori pli efikajn metodojn por ke efektive eŭropanoj estu laŭeble multlingvaj kaj ke la lingva egalrajteco de malgrandaj lingvoj estu pli konsiderata.

Se vi opinias ke Eŭropa Unio jam havas komunan lingvon (la anglan), ni demandas vin, kiam estis akceptita tia decido kaj de kiu organo de EU? Vi mem subtenas la ideon ke ĉiuj kulturaj kaj lernejoj aferoj restu en ekskluziva kompetenco de la ŝtatoj-membroj. Kiel subite ni havas

komunan lingvon en EU? Ĉu vi jam forgesis kion signifis la trudo de la rusa en la eksa spaco de soveta influo?»

Zlatko Tišljár, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio

FLAGOMASTO NUR POR ESPERANTA FLAGO EN HERZBERG AM HARZ

Ni tre ĝojas, ke Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo havas novan unikan Esperanto-fenomenon. Ĉe la memorejo Joachim-Giessner antaŭ la stacidomo en Herzberg nun estas konstanta granda flagomasto, nur pro kaj por Esperanto!

La administracio de la Esperanto-urbo Herzberg komisiis la Esperanto-Centron je hisado de la granda Esperanto-flago ĉe la vizitado de gravaj Esperanto-gastoj, internaciaj kunvenoj kaj Esperanto-kongresoj en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Tio estas denova ampruvo de la oficiale Esperanto-urbo mem por la Esperanto-movado. Krome la urbo plibeligis la irvojon ĉirkaŭ la memorejo Giessner. Malantaŭ la Zamenhof-monumento la urbo konstruis belan ŝtonmuron. - Venu, vidu kaj fotu mem!

Petro Zilvar, Zsófia Kóródy, Harald Mantz

URBESTRO DE PARTIZANSKE HELPAS al E@I



Danke al la kunlaboro kaj helpo de la urbodomo, ĉefe de la urbestro s-ro Jozef BOŽIK la 1-an de julio 2011 la asocio E@I (Edukado@Interreto) havas sian oficejon, ĉambrn de 60m² por laborado de kvin personoj, en la urbo Partizánske (Slovakio).

La ejo estas al E@I disponigita kontraŭ simbola unu eŭro jare. En aŭgusto okazis oficiala akcepto de E@I-teamo ĉe la urbestro. Peter BALÁŽ, Jevgenij GAUS kaj Erin PIATESKI dankis al s-ro Jozef Božik pro la malavara disponigo

de la oficejo, kaj la urbestro persone confirmis sian apogon al Esperanto kaj al la agado de E@I. Li esprimis sian deziron en proksima estonto ankoraŭ pli intense kunlabori kaj videbligi Esperanton en la urbo, kaj la urbon inter la esperantistoj. La foto montras tiun akcepton: de maldekstre Peter Baláž, Erin Piatieski, Jevgenij Gaus kaj la urbestro Jozef Božik.

Petro Baláž

El n-ro 10 (204) La Ondo de Esperanto, 2011

MEMORE AL VACLAV HAVEL



Vaclav Havel mortis.

Li estis unu el la elstaraj personoj de la ĉeĥoslovaka liberecbatalo kontraŭ la komunista sistemo, la lasta prezidanto de Ĉeĥoslovakio kaj la unua prezidanto de Ĉeĥio. Jen sprita diraĵo de li:

"Espero estas - kontraste al la optimismo - ne la atendo ke ĉio bone finiĝos, sed la engaĝiĝo en la certeco, ke io estas sencohava sendepende de ties fino."

Kiel videblas en la supra foto, li esprimis ankaŭ simpatian al Esperanto dum la Ekonomia Forumo en Krynica en 2009.

J-K Rinaldo de Padova

POR LA ANGLIGO DE LA MONDO KUNKULPAS KORPORACIAJ INTERESAJ


La angligo de la mondo ŝajne okazas pro malantaŭkulisa laboro de la brit-usonaj institucioj, verŝajne kun korporaciaj interesoj.

Rigardu ekzemple Academic Cooperation Association, kiu povus esti fronto por puŝi la anglan lingvon en EU. (<http://www.aca-secretariat.be/index.php?id=32>). Tiun fondis interalie

British Council. British Council mem estis, laŭ Phillipson, fondita ĉefe per mono de Shell. Shell estas nederlanda kompanio. Do oni ne pensu nur pri naciecoj, sed pri korporaciaj interesoj.

Ian Fantom

PLEJ NECESE ESTAS KONI LA ĜUSTAN TEMPON AGI



Estante komercisto, sciojn pri reklamado mi havas, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp.

Mia celo estas vekti la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn. Post 9-foja reklamado en Le Monde, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, S-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi

reagantojn al la Z-taga tutpaĝa anonco.

Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsanis. Mi telefonis al mia edzino: « Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri ». Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, mi ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al Le Monde; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premordo kaj ke ili estis monavidaj... sed 'dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj'.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur 1-foje reklamis en 1 lando... ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en Rzeczpospolita en 2004, okazis lunĉdebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkigis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en 'Le Monde'. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvart li kunorganizis la debaton 'Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?' por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭtakcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj tro da antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en La Repubblica en 2003, 8 italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon de E-o en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ menci, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvarť sendis kopiojn de la aperaĵo en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos. Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas vekti la homaron, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia senprecedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke LA konigu la reklamojn al iliaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj aŭ aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperantistaro opinias?

Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Deguĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Deguĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintecon kaj ignoras la estontecon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'.

Etsuo Miyoshi

INTERNACIA BLINDULA KONGRESO EN UKRAJNO

Preskaŭ tuj post la apero de Esperanto, pri ĝi ekinteresiĝis ankaŭ blindaj homoj el diversaj landoj. Ili ekkonsciis, ke por ili tio estas nova fenestro al la mondo, nova ebleco de internaciaj kontaktoj.

Jam en la jaro 1921 en Prago okazis la unua Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE). Ekde tiu memorinda evento preskaŭ ĉiujare en diversaj landoj de Eŭropo kolektiĝas la blinda esperantistaro, plejparte por konatiĝi, renkonti la malnovajn amikojn, prezenti siajn talentojn kaj pensojn pri diversaj problemoj de la lingvo, de la tuta homaro kaj de blinduloj mem. Kune ni serĉas solvojn de specifaj problemoj de la vivo sen vidpovo. Ni kolektiĝas ankaŭ por plialtigi nian lingvonivelon, por enkonduki en Esperantujo la komencantajn

esperantistojn, por pruvi, ke Esperanton ne eblas nomi mortinta lingvo, ĉar ni povas per ĝi komuniki, ekkoni la mondon, la kulturojn de diversaj popoloj.

En 2011 ni celebris la 90-jariĝon de la unua IKBE, denove en Prago. Venont-somere la gastiganta kongreslando estos Ukrainio. Ni esperas, ke ankaŭ la 78-a IKBE estos interesa kaj neforgesebla evento por ĝiaj partoprenontoj.

Estas invitataj ankaŭ la vidantoj, ĉar unue, la blinduloj ofte bezonas helpon kaj due, la programo estas presakŭ sama kiel tiu de kutimaj E-renkontiĝoj.

La detalojn eblas vidi en <http://www.lineckij.org.ua/front.files/Page895.htm>

Bonvenon en Ukrainion!

Olena Poŝivana, Membro de la Organiza Komitato

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 25-an de decembro 2011

Redaktoro: Zlatko Tiŝljar

En la numero kunlaboris: Mirjana Ŵeželj, Zlatko Tiŝljar, Margarita Ŵelve, Maja Tiŝljar, Seán Ó Riain, Francisko Witucki, Ranieri Clerici, Petro Zilvar, Zsófia Kóródy, Harald Mantz, Petro Baláz, J-K Rinaldo de Padova, Ian Fantom, Etsuo Miyoshi, Olena Poŝivana

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

